Kvaronjara **Bulteno** de la · Quarterly **Bulletin** of the

# Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto
# American Association of Esperanto Teachers

(Sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) (Branch of the International League of Esperantist Teachers)

Numero 190 ISSN: 0002-7499 novembro 2012

## Enhavo

AATE Matters
- Remembriĝu! ....1
- Renew your membership! ....1
- Protokolo de la 53-a jarkunsido de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto ĉe la Universitato de Teksaso en Dallas, Texas, Usono, la 24-an de junio 2012 ....2
- Kion AAIE nun faras? ....3
- Duncan Charters elektita tria reprezentanto de AAIE al ILEI ....3
- Glossop kaj Harris Partoprenis la 45-an ILEI-Konferencon ....3

Esperanto en la reto
- Ŝanĝoj ĉe AAIE.us ....4
- Universitataj kursoj pri diversaj temoj ĉe la retejo de la Universitato de Esperanto ....4

Aferoj de ILEI
- Raporto pri 45-a konferenco de ILEI ....4
- La venontjara konferenco de ILEI ....6
- Mortis la albana sekciestro de ILEI ....6

Kalendaro ....6

Nekrologoj
- Mary Napolitan ....8
- Dori Vallon-Wheeler ....8

Bonvolu kontribui al la Bulteno ....9

Coming in the next Bulteno ....9

Informo kaj Invito al la 46-a Konferenco de ILEI en 2013 ....10

Course report form ....11

Membership form ....12

### Aferoj de AAIE

## Remembriĝu!

La nova jaro komenciĝos post nur kelkaj semajnoj, do venas la tempo por remembriĝi en AAIE kaj ILEI.

Ĉi-jare estas kelkaj ŝanĝoj. Kiel klarigas sekcio 8 de la protokolo de la jarkunsido sur paĝo 2, necesis plialtigi la jaran kotizon ĝis $50 por la surpaperaj, perpoŝtaj versioj de la *Bulteno* kaj *Internacia Pedagogia Revuo*, sed la kotizo por la elektronikaj versioj estas nur $25.

Pli bona novaĵo: Nun eblas membriĝi aŭ remembriĝi per kreditkarto ĉe la libroservo de Esperanto-USA. Ĉe http://esperanto-usa.org/retbutiko vi povas klaki "AAIE/AATE Memberships" maldekstre de la paĝo kaj tiam elekti ricevi eldonaĵojn aŭ surpaperajn aŭ elektronikajn. Krom la kotizo kaj la maniero ricevi la revuojn, la membrecoj estas egalaj.

Kompreneble, eblas ankaŭ remembriĝi per ĉeko uzante la formularon sur la fina paĝo de ĉi tiu *Bulteno*.

## Renew your membership!

The new year begins in just a few weeks, so the time has come to renew your membership in AATE and ILEI.

This year there are several changes. As explained in section 8 of the minutes of the annual meting on page 2, it was necessary to increase the annual dues to $50 for mailed paper versions of the *Bulletin* and *International Pedagogical Review*, but the dues for the electronic versions are just $25.

Better news: It is now possible to join or renew by credit card via the Esperanto-USA book service. At http://esperanto-usa.org/retbutiko you can click "AAIE/AATE Memberships" on the left side of the page and then choose to receive publications either on paper or electronically. Aside from the dues and the methods of receiving the magazines, the memberships are the same.

Of course, you can also renew by check using the form on the last page of this *Bulletin*.

*Redaktoro:* Gary Grady, 3119 Lassiter St, Durham NC 27707-3888 USA <Gary@DGaryGrady.com>
*Prezidanto:* Ron Glossop <rglossop@mindspring.com>
*Vic-Prezidanto*: Jeremy Aldrich <gxeremio@gmail.com>
*Eduka Sekretario:* Gary Anderson <ganderson@SeattleAcademy.org>
*Koresponda Sekretario:* Dorothy Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara CA 93111-2521 USA <dorothyjeanh@gmail.com>
*Kasisto:* Chuck Mays <charles.o.mays@gmail.com>

# Protokolo de la 53-a jarkunsido de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto

## ĉe la Universitato de Teksaso en Dallas, Texas, Usono
## la 24-an de junio 2012
## de 14h00 ĝis 15h00
## (kadre de la landa kongreso de Esperanto-USA)

Ĉeestis entute 15 homoj, el kiuj 10 estas AAIE-membroj (Gary Anderson, Elizabeth Dorcas, Filipo Dorcas, Ellen Eddy, Gary Grady, Ron Glossop, Lusi Harmon, Doroteo Holland, Chuck Mays, kaj Arnold Victor) kaj 5 ne-membroj (Charlortte Burton, David Dougherty, Jessica Grasso, Werner Mueller, kaj Timothy Rice).

1. Prezidis prezidanto Ron Glossop, kiu unue prezentis la jenajn *ĉeestantajn estraranojn*: Vic-prezidanto Jeremy Aldrich; kasisto Chuck Mays; redaktoro de nia Bulteno Gary Grady; kaj Koresonda Sekretario Doroteo Holland. Nia Eduka Sekretario, Sheri Wells, ne ĉeestis.
2. La protokolo de la lastjara kunsido en Emeryville, Kalifornio, estas unuanime aprobita.
3. *La raportoj de la jenaj estraranoj estas unuanime aprobitaj*:
   a. Prezidanto Ronald Glossop
   b. Kasisto Chuck Mays
   c. Eduka Sekretario Sherry A. Wells
   d. Redaktoro de la *Bulteno* Gary Grady
   e. Vic-Prezidanto Jeremy Aldrich (kiu raportis perrete dum la kunsido)
4. La *raportoj de la jenaj kunlaborantaj grupoj* estas unuanime aprobitaj:
   a. Perkoresponda Esperanto-Kursaro
   b. Usona Ekzamena Servo
5. La jena raporto de la *Kandidatiga Komitato* estas unuanime aprobita:
   a. Por prezidanto: Ron Glossop
   b. Por Vic-Prezidanto: Jeremy Aldrich
   c. Por Kasisto: Chuck Mays
   d. Por Koresponda Sekretario: Doroteo Holland
   e. Por Eduka Sekretario: Gary Anderson
6. *Voĉdonado pri AAIE-estraranoj*
   a. Doroteo raportis ke ŝi ricevis 14 plenumitajn balotilojn, ĉiuj el kiuj jese voĉdonis por la supre menciitaj kandidatoj.
   b. Voĉdono de tiuj kiuj ĉeestis ĉi tiun jarkunsidon estis unuanime jesa.
   c. Do, la *supre menciitaj kvin kandidatoj (Ron Glossop, Jeremy Aldrich, Chuck Mays, Doroteo Holland, kaj Gary Anderson) estas aprobitaj, ĉiu por 3-jara deĵoro*.
7. La jenaj tri AAIE-reprezentantoj ĉe la ILEI-komitato por 2012-2015 estas unuanime elektitaj: Ron Glossop, Lusi Harmon, kaj Vilĉjo Harris.
8. Finances
   a. a. Treasurer Chuck Mays gave the following report on our present financial situation
   - Since every AAIE member is automatically a member of ILEI, our treasurer annually pays ILEI dues for each AATE member.
   - Although life members have been encouraged to opt to receive publications electronically (=$25 instead of $40 per year), in 5 years AAIE will no longer have enough money to pay ILEI dues for our 20 life members.

   b. Lucy moved, and Phillip seconded, that AAIE annual dues be increased to $25 for e-mail receipt of the AAIE Bulletin and the ILEI "Internacia Pedagogia Revuo", and $50 via regular mail. Motion passed unanimously.
   c. In addition, it was agreed that life members should be encouraged to make generous donations to AATE.
   d. It was also agreed that the AATE board will make arrangements for payment of AATE dues via credit card.
9. Ĉar mankis tempo, la jenaj aferoj ne estis traktitaj:
   a. Adopto de AAIE-buĝeto por la venonta jaro
   b. Diskuto pri la instruado de Esperanto en Usono kaj Kanado
   c. Aliaj komentoj kaj ideoj pri la instruado de Esperanto
   d. Ĉu AAIE devus havi kunvenojn per Google+?
   e. Anoncoj kaj aliaj sugestoj kaj proponoj por la pliboniĝo de AAIE

---

Tuj post la supre traktita kunveno, kaj dank' al teknika helpo de Chuck Mays kaj al antaŭaj aranĝoj inter Prezidanto Glossop kaj Katalin Kovats, ni per la magio de la reto aŭdis kaj konversaciis kun Katalin Kovats en Nederlando. Ŝi estras la retejon http://edukado.net por instruistoj de Esperanto, kaj ŝi parolis pri tiu retejo, pri la instruado de Esperanto, pri la 100-leciona Reta Instruista Trejnado (RITE) kaj pri la uzo de la KER-ekzamenoj en aliaj landoj.

*Respekte submetita de Doroteo Holland*
*Koresponda Sekretario, AAIE*

# Kion AAIE nun faras?

Ĉe nia AAIE-jarkunsido en Dalaso, *ni elektis nian funkciulojn por la venontaj tri jaroj:* Prezidanto—Ron Glossop, Vic-Prezidanto—Jeremy Aldrich, Kasisto—Chuck Mays, Koresponda Sekretario—Doroteo Holland, Eduka Sekretario—Gary Anderson.

*Ni ankaŭ elektis tri AAIE-reprezentantojn esti niaj ILEI-komitatanoj por 2012-2015*: Ron Glossop, Lusi Harmon, kaj Vilĉjo Harris. Dum Julio Ron (kiu ankaŭ estis anstataŭanto por Lusi) kaj Vilĉjo partoprenis la ILEI-konferencon en Kunming, Yunnan, Ĉinio. *Ĉe tiu konferenco Vilĉjo estis elektita esti la ILEI-Estrarano por Financoj dum la venontaj tri jaroj*.

**Ĉe tiu jarkunsido la membraro unuanime aprobis altiĝon de la AAIE-kotizo por la jaro 2013 al *$25* por elektronika ricevo de la AAIE-kaj la *Internacia Pedagotia Revuo* kaj al *$50* por perpoŝta ricevo de tiuj materialoj.**

Dum la jarkunsido Kasisto Chuck Mays raportis ke AAIE havas financan problemon. Se ne okazos ŝanĝo, post kvin jaroj AAIE ne plu havus sufiĉe da mono por pagi la ILEI-koktizojn por niaj 20 dumvivaj membroj. *Pro tio, ni rekomendas ke ĉiuj dumvivaj membroj devus mendi la materialojn elektronike aŭ pagi $50 jare por ricevi ilin perpoŝte eĉ kvankam ili estas dumvivaj membroj.* Plue oni sugestis ke membroj, aparte dumvivaj membroj, *devus fari malavarajn kontribuojn al ILEI*. Feliĉe tri membroj jam faris tion.

Ni ankaŭ konsentis ke la AAIE-estraro penos fari aranĝon por ke membroj povu pagi la kotizon per kredit-karto. La estraro ankaŭ esploros la eblecon iĝi 501(c)(3) edukado-organizo por ke oni povu subtrahi kontribuojn al AAIE kiam oni pagas enspez-imposton.

Je la 13-a de Oktobro Ron Glossop (kun multe da helpo de Chuck Mays) donis prezentaĵon ĉe la konferenco de la Asocio de Fremdlingvaj Instruistoj de Nord-Karolino (FLANC) en Winston-Salem pri **"Ĉu viaj studentoj povus lerni pli rapide se ili mallonge unue studus Esperanton?"** Ni opinias ke ĉi tiu ideo instigos pli da intereso pri Esperanto, eble finfine eĉ la instruado de Esperanto en elementaj lernejoj.

La venonta AAIE-jarkunsido okazos dum la landa kongreso de Esperanto-USA en *Raleigh, NC* ekde la 5-a ĝis la 8-a de Julio, 2013. Ĝi *probable okazos je dimanĉo, la 7-a de Julio*. Ni esperas ke tiam ni povos havi diskuton pri la laboro de AAIE. Kion AAIE devus fari ke ni ne faras?

*—— Ron GLOSSOP, Prezidanto, AAIE*

# Duncan Charters elektita tria reprezentanto de AAIE al ILEI

Ĉe la AAIE-jarkunsido en Dalaso en Junio 2012 ni determinis ke niaj tri ILEI-komitatanoj dum la postaj tri jaroj estus Lusi HARMON, Vilĉjo HARRIS, kaj Ron GLOSSOP.

Sed ĉe la 2012 ILEI-konferenco en Kunming, Ĉinio Vilĉjo HARRIS estis elektita iĝi la ILEI-Estrarano pri Financaj Aferoj dum la venontaj tri jaroj, kaj la mandato de Duncan CHARTERS kiel ILEI-Vicprezidanto finiĝis. Tial Vilĉjo aŭtomate iĝis membro de la ILEI-estraro. Samtempe Duncan CHARTERS ne plu estis membro de la ILEI-estraro.

Vilĉjo tiam oficiale rezignis kiel ILEI-komitatano por AAIE. Sekve la AAIE-estraro nun devas decidi pri la tria ILEI-komitatano por AAIE dum la venontaj tri jaroj.

Unu evidenta ebleco estis ke Duncan CHARTERS povus iĝi tiu tria ILEI-komitatano. Oni demandis al Duncan pri tiu ebleco, kaj li indikis ke li akceptus tiun postenon. Je la 18-a de Oktobro 2012 la AAIE-estraro oficiale elektis Duncan CHARTERS iĝu la tria ILEI-komitatano por AAIE dum la venonta du jaroj.

Ĉe la AAIE-jarkunsido en la jaro 2015 AAIE devos elekti niajn novajn funkciulojn por la tri postaj jaroj. Tio inkluzivos la ILEI-komitatanoj de AAIE. La kvanto de ILEI-komitatanoj dependas de la kvanto de AAIE-membroj.

*—— Ron GLOSSOP, Prezidanto, AAIE*

# Glossop kaj Harris Partoprenis la 45-an ILEI-Konferencon

Du Usonanoj, Ron GLOSSOP kaj Vilĉjo HARRIS, partoprenis la 2012-ILEI-konferencon en Kunmingo, Yunnan, Ĉinio inter la 20-a kaj la 26-a de Julio 2012. Entute 104 Esperantistoj el 15 landoj ĉeestis la 46-an ILEI-konferencon,la plej grandan dum almenaŭ 26 jaroj. El Ĉinio venis 64 homoj (!), sed ankaŭ estis 9 el Nepalo, 8 el Korea Respubliko, kaj 7 el Japanio. Rilate al la ne-Aziaj landoj estis ankaŭ du el Aŭstralio, Francio, Germanio, kaj Hungario, plus unu el Belgio, Britio, Finnlando, Nederlando, Rumanio, kaj Svislando.

La konferenco okazis ĉe la Profesia Artkolegio de Kunmingo, kaj la temo estis "La Arto de Komunikado, Komunikado de Artoj." Estis imponaj programoj je la komenco kaj denove je la fino de la konferenco kiel registraraj oficuloj kaj eminentuloj parolis, la artaj studentoj dancis kaj kantis, kaj pli ol 300 homoj ĉeestis. Dum la konferenco okazis dulingva seminario en kiu parolis kelkaj Esperantistoj kaj kelkaj ĉinaj universitatanoj spertaj pri lingvoj kaj kulturoj. Ekzemple, ***S-ro YUAN Hongyu, Prezidanto de Yunnan [provinco] Esperanto-Asocio***, parolis pri "Yunnan bezonas Esperanton" (ĉar estas 25 malgrandaj etnaj grupoj kun apartaj lingvoj en tiu provinco) kaj **D-ro GLOSSOP** parolis pri "Kiel artistoj povas antaŭenigi Pacan Mondon." Je la fino okazis grandaj piroteknikaĵoj kiuj eĉ allogis kelkajn loĝantojn el la urbo Kunmingo.

Dum la konferenco la ILEI-komitato akceptis du veteranajn ĉinajn Esperantistojn iĝi Honoraj Membroj de ILEI: LI Shijun (Laulum) kaj LI Weilun. Ili akceptis tri novajn landajn sekciojn en ILEI-on: Mongolio, Nepalo, kaj Vjetnamio. Oni aranĝis Lingvan Festivalon. Ankaŭ estis multaj aliaj prezentaĵoj kaj kunsidoj. La ĉefa organizantino de la konferenco estis s-ino GONG Xiaofeng (Arko) el

Ĉinio, la sekciestro por ILEI en Ĉinio.

Grava afero estis la elekto de novaj ILEI-funkciuloj por la venontaj tri jaroj. Stefan MACGILL el Hungario estis reelektita Prezidanto. S-ino Zsofia KORODY el Germanio estis elektita Vicprezidanto. Radojica PETROVIĈ el Serbio estis elektita Sekretario. **Vilĉjo HARRIS el Usono estis elektita Estrarano pri Financoj**. Estis elektita ankaŭ rekorda kvanto (kvin) de aliaj ILEI-Estraranoj: s-ino Magdalena (Fejfi) FEIFIĈOVA el Slovakio, Bharat GHIMIRE el Nepalo, s-ino GONG Xiaofeng (Arko) el Ĉinio, s-ino Eniko Zengo SEREGHY el Hungario, kaj s-ino Penny VOS el Aŭstralio.

En la venonta jaro la ILEI-konferenco okazos en Sieber, Herzberg, Germanio ekde la 12-a ĝis la 18-a de Julio, la semajno antaŭ la UK en Rejkjaviko, Islando.

—— Ron GLOSSOP, AAIE-Prezidanto

### Esperanto en la reto

# Ŝanĝoj ĉe AAIE.us

Nia retejo ĉe http://AAIE.us havas novan aspekton, kaj la enhavon ni pligrandigadas. Bonvolu viziti ĝin kaj esplori. La redaktoro de la *Bulteno* respondecas ankaŭ pri la retejo, do se vi havas korektojn, sugestojn, aŭ demandojn, mi petas, ke vi sendu ilin al Gary@DGaryGrady.com.

Alia, tute nova, ebleco estas sendi mesaĝon al estrarano pere de la retejo mem. Simple elektu "Kontakti nin", kaj vi vidos facilan formularon kun la ebleco elekti la estraranon, al kiu vi volas sendi mesaĝon.

Nun ankaŭ eblas rete raporti vian instruadon, sen la neceso plenumi paperan formularon. Kompreneble, vi ankoraŭ povas uzi paperon se vi preferas, kaj tiucele ni aperados la kutiman formularon en ĉiu numero de la *Bulteno*.

Ni esperas, ki vi ĝuos la novan aspekton de la retejo, kaj ke vi sendu sugestojn por plibonigi ĝin. Ni bonvenigas ankaŭ novaĵojn kaj artikoloj por kaj la retejo kaj la *Bulteno*.

# Universitataj kursoj pri diversaj temoj ĉe la retejo de la Universitato de Esperanto

Doroteo Holland sciigas nin pri interesa retejo, tio de la Universitato de Esperanto <http://www.universitato.info>.

En januaro kaj februaro ĉi-jare, por celebri la 125-jaran datrevenon de Esperanto, du universitataj kursoj estis instruitaj sur la insulo Hajnano en Ĉinio, *Filozofio kaj Historio de la Informadiko* de Profesoro Federico Gobbo, Italio, kaj *Alfronti Militon* de Profesoro Ron Glossop, Usono.

La kursoj estis filmitaj, kaj en la estonteco oni povos senpage aspekti la lecionojn kadre de la retejo. Efektive, oni jam povas spekti kelkajn lecionojn el tiuj du kursoj, kaj ankaŭ la unuan lecionon de tria kurao, *Astronomio kaj Astrofiziko* de Profesoro Amri Wandel, Israelo.

La Universitato de Esperanto invitas aliajn profersorojn instrui esperantan version de nacilingva kurso, kiujn ili instruas.

### Aferoj de ILEI

# Raporto pri 45-a konferenco de ILEI

Kiel raportis Ron Glossop sur paĝo 3, la 45-a Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazis la de la 20-a ĝis la 26-a de julio 2013 ĉe la Profesia Kolegio pri Artoj en Kunmingo, Ĉinio, en la sud-okcidena provinco Yunnan.

Okazis kadre de la konferenco Lingva Festivalo, en kiu estis prezentitaj 18 lingvoj kaj altiris studentojn el la kolegio.

Partoprenis en la konferenco 104 homoj (preskaŭ ĉiuj el la 113 aliĝintoj), do ĝi estis la plej granda ekstereŭropa konferenco de ILEI kaj ĝi estis ankaŭ la plej granda en la lastaj 26 jaroj.

Dum la solena fermo kaj adiaŭa koncerto restis neniu libera sidloko en la 300-seĝa aŭditorio pro la ĉeesto de aliaj homoj.

La prezidanto de la Profesia Kolegio pri Artoj, s-ro Duan Yongxing, bonvenigis la konferencon en Esperanto dum la solena malfermo, kaj ankaŭ faris la lastan prelegon dum la solena fermo. Dum la lasta li elkore gratulis la partoprenantojn pro la fruktoplenaj rezultoj de la konferenco kaj la simpozio. Li esprimis deziron, ke la kolegio kaj ILEI povos longdaŭre kunlabori.

(Mallongigita de raportoj ĉe http://ilei.info/.)

## La nova estraro de ILEI

Dum la konferenco en Kunmingo oni anoncis la novan estraranojn de la Ligo:

- Prezidanto: s-ro Stefan MacGill, Hungario/Nov-Zelando
- Sekretario: s-ro Radojica Petrović, Serbio
- Estrarano pri financoj: s-ro Bill Harris, Usono

Pliaj estraranoj (taskdivido anoncota):

- s-ino Gong Xiaofeng (Arko), Ĉinio
- s-ro Bharat Ghimire, Nepalo
- s-ino Magdalena Feifičova (Fejfi), Slovakio
- s-ino Enikő Zengő Sereghy, Hungario
- s-ino Penny Vos, Aŭstralio
- s-ino Zsófia Kóródy, Germanio/Hungario

## Rezolucio de la konferenco de ILEI en Kunmingo

*La 45a Konferenco de ILEI, okazinta inter la 20a kaj 26a de julio 2012 en Kunmingo, Ĉinio, kun 113 aliĝintoj el 19 landoj:*

- ★ *Deklaras sian entuziasman apogon al la nune diskutata Strategia Vizio de UEA; la Ligo kunlaboros en ĝia kompletigo en la formo de Strategia Plano.*
- ★ *Apogas la vizian reliefigon de demokrata decidado en la Asocio, la klara elstarigo de ĉefaj agadkampoj kaj de la aktivigo de membroj kaj la landaj kaj fake asocioj.*
- ★ *Subtenas la eneston de la grava principo de lingva justeco, kaj proponas enkadrigi ĝin en la ideon de tutmonda solidara socio.*
- ★ *Bonvenigas aparte la specifecon de la vizio, kiu antaŭvidas konkretajn subcelojn, kiuj estu realigeblaj, mezureblaj kaj ambiciaj.*
- ★ *Kaj laŭdas forte la planojn dediĉi pli el la asociaj rimedoj al progreso en la kernaj agadkampoj, inter kiuj klare troviĝas la edukado kaj instruado.*




*Supre: la solena malfermo, kun koruso de studentoj de la arta kolegio, kie okazis la konferenco. Sube: Grupfoto fine de la Konferenco.*



# La venontjara konferenco de ILEI

Aperis la 30-an de oktobro la unua komuniko de la venontjara konferenco de ILEI. Ĝi okazos 12-18 julio 2013 (la semajnon antaŭ la UK kaj 4 tagojn post la usona landa kongreso) en Herzberg am Harz, Germanio. La urbo Herzberg am Harz dum kelkaj jaroj oficiale nomas sin "Die Esperanto-Stadt"—"La Esperanto-Urbo" (vidu http://www.herzberg.de kaj http://esperanto-urbo.de).

La ĉeftemon de la konferenco oni priskribas jene: "La loĝantaro en multaj landoj maljuniĝas. Kulturaj kaj klerigofertoj por ĉiuj generacioj aperas ekz. en la eŭropa programo *Dumviva Lernado*, el kiu ankaŭ Esperanto-projektoj ricevadas subvenciojn. Kion ni lernu el tiuj projektoj? Kiun strategion ILEI ellaboru kaj sekvu, kiujn metodojn ni uzu por realigi Esperanto-instruadon de frua infanaĝo ĝis la t.n. tria generacio? Kiel ni kunlaboru kun neesperantistaj fakaj asocioj, institucioj ktp.?"

Ĝis la fino de marto la konferenca kotizo por membroj de AAIE estas 50 eŭroj. Se oni aliĝos dum aprilo, majo, aŭ junio ĝi kostos €60, kaj en julio €70. La kotizo ne inkluzivas manĝojn nek loĝadon. La plena oficiala komuniko aperas sur paĝo 10.

# Mortis la albana sekciestro de ILEI

Forpasis la 28-an de oktobro la eminenta albana esperantisto Vasil Pistoli (1923-2012), konstruinĝenierio kiu deĵoris longan tempon en Ministrejo pri Konstruado kaj poste estis proferoso en lia kampo en Universitato de Tirana. Li instruis Esperanton dum pli ol 50 jaroj kaj tre aktivis en la Esperanto-movado en sia lando, malgraŭ la malfacilaĵoj aparte dum la unuaj jardekoj de lia aktiveco, kiam Albanion regis totalisma reĝimo.

Dum kelkaj jaroj li estris Albanan Esperantistan Ligon kaj poste li servis kiel direktoro de la Albana Esperanto-Instituto. Li organizis kaj instruis kursojn, prilaboris lernolibron, ekzamenojn, kaj instrumetodojn, multe tradukis en kaj el Esperanto, informadis pri la lingvo, kaj multege laboris por kompili grandan vortaron esperantan-albanan.

# Kalendaro

## 2012

**15 decembro**
**Naskiĝtago de d-ro L.L. Zamenhof.**

## 2013

**10 – 16 januaro**
**Jarkongreso de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio** en Auckland. La programo enhavas ekskurson en la belan pejzaĝon de Auckland. Informo: http://bit.ly/U1jMEJ

**18 – 22 januaro**
**48a Brazila Esperanto-Kongreso** en Barra do Garças, MT Brazilo. Ĉeftemo: "Esperanto, Kulturo kaj Turismo: Alternativoj por verda ekonomio". Informo: http://bitly.com/Tsluyr

**19 januaro – 21 Februaro**
**Esperanto-Insulo II** en Hajnano, Ĉinio. Kursaro kun tri sekcioj, por komencantoj, por Esperantistoj kiuj volas lerni kiel instrui en Ĉinio kaj alilande, kaj por spertaj Esperantistoj kiuj volas studi kurson de la Universitato de Esperanto, plejparte pere de televida kurso kaj posta diskutado. Informo: http://www.esperanto-insulo.info

**5 – 8 aprilo**
**Indonezia Esperanto-kongreso** en Bogor, Indonezio. La unua Indonezia Esperanto-Kongreso okazos en Wisma Abdi, Bogor. La fokuso de la kongreso estos je lernado, ekzamenado, kaj kreo de nacia asocio. *Instruistoj kaj ekzamenantoj eksterlandaj sercataj!* Informo: http://bit.ly/RFJiiT

**18 – 22 aprilo**
**7-a Azia Kongreso de Esperanto** en Jerusalemo, Israelo. Informo: http://www.esperanto.org.il/ak2013.html

**3 – 5 majo**
**72-a Hispana Esperanto-Kongreso** en Zaragoza, Hispanio. Temo: Lingvo kaj sento — "Jen la temo kaj mot(iv)o de nia kongreso, laŭ la difino de Esperanto farita de K. Kalocsay." Informo: http://www.esperanto.es/kongreso

**10 – 12 majo**
**Brita Kongreso 2013** en Ramsgate, Britio. Laŭnome Brita Kongreso sed pro la proksimo de Ramsgate al La Kontinento, efektive 3-landa Markola kongreso. *Gastoparolanto la kuratoro de Edukado.net, Katalin Kovats.* Informo: http://britakongreso.org

**17 – 20 majo**
**90a Germana Esperanto-Kongreso** en Nürnberg, Germanio. Kongreso de GEA kaj festo okaze de la 125-a jubileo de la Nuernberga Esperanto-grupo. Informo: http://www.esperanto-nuernberg.de

**18 – 20 majo**
**10-a MEKARO—Mez-kanada renkontiĝo de Esperanto** en Otavo, Ontario, Kanado. Turisma amikeca semajnfino. Okazas vizitoj kaj komunaj manĝoj en restoracio, ktp. Informo: http://www.mekaro.ca/

**7 – 10 junio**
**108-a (!) Skota Kongreso de Esperanto** en Linlithgow, Skotlando (inter Glasgow kaj Edinburgh). Partoprenu la plej altan kongresnombron en Esperantio kun esperantistoj el Skotlando kaj aliloke en agrabla etoso, kun bunta programo inkluzive viziton al histoririĉa Linlithgow-Palaco, naskiĝejo de Maria Stuart, kaj krozeton en la Unuiĝo-Kanalo. Informo: http://bit.ly/R3MMxh

**27 junio – 4 julio**
**Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK)** ĉe la Universitato William Peace en Raleigh NC. Informo: http://esperanto.org/nask/

**5 – 8 julio**
**Landa Kongreso de Esperanto-USA** ĉe la Universitato William Peace en Raleigh NC. *La jarkunsido de AAIE okazos kadre de la landa kongreso.* Informo: http://esperanto-usa.org/en/content/landaj-kongresoj-national-congresses

**12 – 18 julio**
**Konferenco de ILEI**. Temo: "Instruado de Esperanto al ĉiuj aĝgrupoj". Loko: Herzberg, Germanio. Informo: http://www.ilei.info/novajxoj/unua_komuniko2013.php

**20 – 27 julio**
**98-a Universala Kongreso de Esperanto** en Reykjavík, Islando. Informo: http://uea.org/kongresoj/uk_2013.html

**19 - 26 aŭgusto**
**69-a Internacia Junulara Kongreso** ĉe Kibuco Afikim (proksime de la Lago de Galileo), Israelo. Infomo: http://www.esperanto.org.il/ijk2013.html

**15 decembro**
**Naskiĝtago de d-ro L.L. Zamenhof**

Bv informi nin pri aliaj aranĝoj. Pli aktuala kalendaro troviĝas ĉe http://aaie.us. Por granda listo de Esperanto-aranĝoj tra la tuta mondo vidu la retpaĝon http://www.eventoj.hu/kalendar.htm.



Parto de la tereno de Universitato William Peace en Raleigh, Norda Karolino, kie okazos venontjare la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK), kaj la landa kongreso de Esperanto-USA. (Fotis Chuck Mays.)

**Nekrologoj**

# Mary Napolitan



Ni bedaŭras raporti ke Mary Jeanette Napolitan (née Peacock) forpasis la 27-an de julio en St. Clair Shores, Michigan. Ŝi havis 86 jarojn. Ŝi kaj ŝia edzo (kiu forpasis antaŭ ŝi) havis kvin gefilojn, sep nepojn, kaj du pranepojn. Antaŭ ŝia emeritiĝo ŝi estis profesia instruisto al handikapuloj.

Mary helpis starigi la Esperanto-Societon de Miŝigano kiel neprofitcelan organizaĵon en 1984, kaj estas nomita ties fondinto en la reĝistrejo de korporacioj de la miŝigana registaro. En la 90-aj jaroj ŝi kunlaboris kun Kent Jones kaj Gil Guillory por instrui, konsili, kaj subteni instruistojn de Esperanto en usonaj lernejoj tra la tuta lando.

Mary aliĝis al AAIE en julio 1988, kaj ŝi bone kaj fidele servis kiel nia AAIE-Kasisto ekde 2005 ĝis 2010, sed finfine ne plu povis fari tion pro san-problemo. Ŝi estis longdaŭra membro ankaŭ de Esperanto-USA.

Laŭ komento de Steve Brewer en 2008, "Mi kredas ke estis Mary Napolitan kiu elpensis la simplan kaj klaran ideon de 'Amiko de Esperanto'. Ni trovis la terminon tre utila por paroli pri tiuj, kiuj subtenas la ideon eĉ se ili mem ne volas lerni Esperanton (aŭ simple ĝis nun ne lernis)."

Vi povas sendi kondolencojn (anglalingve) al ŝia filino Marie Kissinger ĉe <mlkissinger.83@gmail.com>.

# Dori Vallon-Wheeler

Dori Wheeler, membro de AAIE ekde 1986, mortis la 2-an de novembro 2012 en Millbrae, Kalifornio. Ŝi estis 86-jaraĝa.


En junio 1991 ŝi iĝs dumviva membro de AAIE kaj ofte poste faris donacojn al ni. Ŝi subtenis ankaŭ aliajn Esperanto-organizaĵojn kaj projektojn. Ekzemple laŭ la filmfaranto Simono Keith, ŝi kontribuis finance al la produkto de la unua animacia filmo (trukfilmo) en Esperanto, "Ĉapeloj", en 2010. Ŝi estis ankaŭ dumviva membro de Esperanto-USA.

Ŝi verkis poemojn en Esperanto, inkluzive "La Kialo Estas", kiu aperis en *Esperanta Antolgio—Poemoj 1887-1981*.

Ekster Esperantio, Dori estis dum multaj jaroj profesia instruisto. Ŝi instruis infanojn en elementa lernejo apud San Francisco kaj de septembro 1989 ĝis marto 1990 ŝi instruis la anglan en Ĉinio.

Dori ofte ĉeestis Esperanto-aranĝojn kaj plej rimarkinde partoprenis en ĉiu Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) ekde la unua en 1969 ĝis 2010. Ŝi lastfoje ĉeestis la landan kongreson de Esperanto-USA en Emeryville en 2011. Ni kiuj konis ŝin ĉiam memoros ŝian grandan rideton kaj oftan ridadon, kaj ni forte sentos ŝian mankon. Vi povas sendi kondolencojn al ŝi nevino Laura Gschwind, 1553 Newlands Ave, Burlingame, CA 94010, Usono, lgschwind@comcast.net.

(Dankon al Anja Harlow, Doroteo Holland, Julie Spickler, d-ro Franklin Montenegro, kaj aliaj por la ĉi-supra informo, kaj ankaŭ al Franklin pro la fotoj.)




*Dori Wheeler dum NASK en 2009. Ŝi partoprenis ĉiun NASK-on de la unua en 1969 ĝis 2010.*



*Sesio dediĉita al la poezio de Dori Vallon-Wheeler (kiu sidas ĉe la tablo) dum NASK en 2009.*

# Bonvolu kontribui al la *Bulteno*

Ĉu vi trovis interesan novan (aŭ malnovan!) lernolibron? Bonvenas via recenzo.

Ĉu vi havas ideojn aŭ konsilon pri instruado, aŭ ĉu vi memoras interesan sperton rilate instruadon, lernadon, aŭ uzadon de Esperanto aŭ lingvoj pli ĝenerale? Ankaŭ bonvenas via artikolo, aŭ eĉ simpla mallonga retmesaĝo pri la temo.

Ĉu vi havas ion por sugesti aŭ diskuti kun la aliaj membroj de AAIE? Bonvolu skribi al la *Bulteno*.

Ni bonvenigas leterojn, retmesaĝojn, kaj artikolojn ĉu longajn ĉu mallongajn, en la angla aŭ Esperanto (aŭ eventuale alia lingvo).

Aparte bonvenas fotografaĵoj, aŭ kun artikolo aŭ memstarantaj.

La limdato por la venonta numero estas la 15a de decembro 2013.

# Coming in the next issue

All members for calendar year 2012 will receive at least one additional issue of the *Bulteno*, which we hope to publish around the end of the year.

The contents will include information about next year's North American Esperanto Courses (June 27–July 4) and the national Esperanto congress (July 5–8), both to take place on the campus of William Peace University in Raleigh NC.

# Informoj kaj invito al
# la 46-a Konferenco de ILEJ en 2013

**Temo: Dumviva lernado: Instruado de Esperanto al ĉiuj generacioj**



**Datoj:** 12-18 julio 2013, semajnon antaŭ UK kun posta vetureblo al Rejkjaviko, Islando.

**Konferencurbo:** Meze de Germanio, Esperanto-urbo Herzberg am Harz, urboparto Sieber. Tiu alloga urboparto de Herzberg am Harz (ekde 2006 oficiale: la Esperanto-urbo) kuŝas en idilie bela valo de la Harz-montaro.

**Loĝado kaj manĝoj**: En 3-stela Esperanto-hotelo kaj restoracio Zum Pass, Haus Iris kaj en feriodomoj.

**Konferencejo:** Komunuma centro de la vilaĝo, kapabla akcepti 150 personojn, kun podio kaj bufedo. Krome uzeblas lernejaj klasĉambroj en tuja apudeco. Ĉio en Sieber estas facile atingebla piedirante.

**Transporto:** de ĉiuj grandurbaj flughavenoj (ekz. Frankfurt, Dortmund, Berlin, Hamburg, Hannover, Leipzig) per trajno ĉ. 3-4 horoj; ene de Eŭropo kaj en Germanio per oftaj rapidtrajnoj.

**Konferenca temo**: La loĝantaro en multaj landoj maljuniĝas. Kulturaj kaj klerigofertoj por ĉiuj generacioj aperas ekz. en la eŭropa 'Dumviva Lernado' programo, el kiu ankaŭ Esperanto-projektoj ricevadas subvenciojn. Kion ni lernu el tiuj projektoj? Kiun strategion ILEI ellaboru kaj sekvu, kiujn metodojn ni uzu por realigi Esperanto-instruadon de frua infanaĝo ĝis la t.n. tria generacio? Kiel ni kunlaboru kun neesperantistaj fakaj asocioj, institucioj, ktp.?

**Kotizoj:** **A:** Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B. **B:** Iamaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Afriko, Latinameriko kaj Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj la Korea Respubliko).

| Aliĝperiodo | ĝis 31.03.2013 | | ĝis 30.06.2013 | | post 30.06.2013 | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Aliĝkategorio | A | B | A | B | A | B |
| ILEI-membro | 50 € | 30 € | 60 € | 35€ | 70 € | 45 € |
| Ne ILEI-membro | 65 € | 40 € | 75 € | 45 € | 90 € | 55 € |
| Junulo, handikapulo | 25 € | 15 € | 30 € | 20 € | 35 € | 25 € |

Rabatoj: kiuj pagas ĝis 31.12.2013 pagas jene: A – 40 EUR, B – 25 EUR.

Premiaj rabatoj: 50% por la 50-a kaj 100% por la centa aliĝintoj.

Loĝado, manĝado, ekskursoj kaj aliaj servoj pagendas aparte.

**La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) – la plej granda ILEI-sekcio, kaj Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo invitas vin!**

Ĉu vi sciis – la lasta ILEI-konferenco en Germanio okazis en 1974. Tempo reveni.

Kiel el Herzberg mem, multaj ŝil-doj aperas ankaŭ en Esperanto



# American Association of Teachers of Esperanto

COURSE REPORT FORM

INSTRUCTOR
Name Address ______________________________________________
Email address ______________________________________________

COURSE
Location ______________________________________________
Tuition cost ______________________________________________
Level: Elementary_____ Intermediate______ Other____________
Beginning and ending dates________________________________
Number of lessons _______ Duration of each lesson ____________
Material used: Books____________________________________________________________
Videos____________________________________________________________
Other____________________________________________________________

STUDENTS
Number finishing course ________ Age range_____________
Previous language skills ___________________________________________________________
Is the course shown in the student records? ___________
Was an AATE exam administered? ___________

FORMATION OF CLASS
Name of organizer____________________________________________________________
Publicity method used_________________________________________________________
Supplier of course materials____________________________________________________

COMMENTS OF INSTRUCTOR
Concerning publicity
___________________________________________________________________________
___________________________________________________________________________

Concerning materials
___________________________________________________________________________
___________________________________________________________________________

Concerning teaching
___________________________________________________________________________
___________________________________________________________________________

*Please return this form to:*

Gary Anderson
6545 17th Avenue N.W.
Seattle WA 98117-5517

E-mail: ganderson@SeattleAcademy.org

**You can also report your teaching on our website at http://aaie.us (select “Raporti kurson” from the menu).**

# American Association of Teachers of Esperanto

## MEMBERSHIP FORM

Voting members consist of professional educators (either active or retired) who are interested in Esperanto, and non-professionals who teach, have taught, or intend to teach Esperanto.

NAME_______________________________________ PHONE (___)_______________

ADDRESS________________________________________________________________

CITY. STATE__________________________________________ ZIP _______________

E-MAIL ADDRESS__________________________________

I do not want the following information to appear in the AATE membership list:

___ My telephone number ___My e-mail address ___Other _______________

NAME & ADDRESS OF SCHOOL ___________________________________________

___________________________________________

Are you a professional educator? ___Yes, active ___Yes, retired ____No

**Memberships are for the calendar year.** If you join in the middle of the year, you will receive "Bulletins" previously distributed during that year. All AATE members are automatically members of the International League of Teachers of Esperanto (Internacia Ligo de Instruistoj de Esperanto) and receive their quarterly *Internacia Pedagogia Revuo*.

Please check one membership category below:

____ One year membership with publications by mail in paper form: $40 ($50 after _____________)

____ One year membership with publications via the Internet in PDF form: $20 ($25 after __________)

Membership for whic calendar year? 20___

___New ___Renewal Today's date:______________________

I enclose $________ as a donation to AATE.

Total enclosed: $______________________.

**Please make your check payable to "American Association of Teachers of Esperanto" or "AATE" on a U.S. bank in U.S. dollars and mail it together with this form to Dorothy Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara CA 93111-2521. To join on line and pay by credit card, visit http://esperanto-usa.org/retbutiko**